

Ora Ĵurnalo

Numero 38, Marto 2021



"La grua danco" en la Gotenburga haveno.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	La Dinastio Broström en Gotenburgo, parto 2.....	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Homoj translokiĝas al Islando, <i>Kerstin Rohdin</i>	19
Espeporko meditas.....	3	Esperanto i Skärstad, <i>Bo Sandelin</i>	21
Besta komento pri homoj	4	Konfirmation i Skärstads kyrka sommaren 1953	24
Funkciado kaj historio pri la vakcinoj.....	4	Helen Keller.... Monica trovis ĉi tiun informon pri ŝi.....	25
La almanako en marto.....	5	Esperanta brajla alfabeto.....	26
Citaĵoj de famaj svedinoj.....	5	Vortludo	27
Okaze de la Internacia Virina Tago, <i>Anna-Lena Wahlberg</i>	6	Tredje delen – 7 viktiga bokstäver i esperanto-alfabetet.....	27
La jaro de la bovo	7	Pri la esperanto-movado en Gotenburgo....	28
Tio estas ni, grupoj!.....	8	Kerstin Rohdin, kiu iam loĝis en Gotenburgo havas memorojn de la sama periodo pri kiu temas la antaŭa artikolo	31
Grupoj ĉe Hornborgasjön la 22an de februaro.....	9	Mira Helwing 74-jara, forpasis, la 30an de decembro, 2020.....	32
El Rumanio: Sagao pri grupo	9	Ĉu vi iam trovis geastrojn?.....	33
Sverigefinnarnas dag 24 februari	10	Fåglar i Kvillebäcken, Backaplan, Hisingen, 20 februari 2021, <i>Jan Hellström</i> ...	34
La dua retkunveno de la Librorondo pri <i>Sesdek ok</i>	11	La nacia floro de Svedio ekde la 13an de marto estas la malgranda kampanulo!.....	35
Referaĵo de prelego de Orlando Raola.....	12	Grupoj/Tranor, <i>Renate Säfström</i>	36
Le chat et le soleil.....	13		
Letero el Viktorio, Kanado, la 22an de februaro.....	14		
Kion ni faru por la fina venko? <i>Lenke Szász</i>	15		
Nemateria kultura mondheredaĵo finlanda, <i>Raita Pyhälä</i>	16		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com.
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas


- ☆ En la sveda radio nun estas serio de programoj pri la multaj malfacilaĵoj, kiujn la bitigado povas kaŭzi al personoj kiuj ne bone regas la novan teknikon. Povas esti aĉeti trajnbileton, malfermi pordojn, identigi sin k.t.p. Paŝon post paŝo ankaŭ Esperantujo cifereciĝas. Ni provas esti en la fronto. En ĉi tiu numero ekz. troviĝas du artikuloj pri retkunvenoj, unu en Google Meet, la alia per Zoom.
- ☆ Sur la unua paĝo du grupoj en la Gotenburgo haveno "dancas" kaj sur alia paĝo multaj birdoj = grupoj dancas – aŭ dancos post la manĝado. Tre malofte du diversaj objektoj havas la saman vorton en Esperanto.
- ☆ Post la apero de nia februara numero okazis almenaŭ tri festotagoj: la nacia tago de la svedfinnoj, la Internacia tago de la virinoj kaj la novjaro de la ĉinoj k.a. Ni ricevis bildon pri la Jaro de la okso de Mongolio.
- ☆ Finnlando kaj Islando havas lokojn en la marta numero. La finna saŭnakulturo nun estas nemateria mondheredaĵo. Gratulon al Finnlando! De Islando ni "heredis" malnovan kulturon, ankaŭ tiun kun varmeco – la varmajn gejserojn.
- ☆ Ni strebas prezenti ion el iu libro de la biblioteko en Stannum ĉiun fojon. Nun mi elektis la periodon 1946 – 1959 el "Esperantorörelsen i Göteborg". Kerstin Rohdin, kiu tiam estis junulino daŭrigas la historion per propraj memoroj. Koran dankon!
- ☆ Memorojn de sia infanaĝo havas Bo Sandelin. Vere interesa historio kiam Esperanto venis al lia Smolanda vilaĝo, Skärstad. Li skribas svede pensante ke ĉefe estos svedoj, kiuj interesiĝas pri svedaj kondiĉoj. Bo iam estis unu el miaj esperantoinstruistoj. Ni legis "La fratoj Leonkoro" – Tre agrable!
- ☆ En la preĝejo de Skärstad mi konfirmaciigis. Tiam mi sciis nenion pri Esperanto.
- ☆ Pri la ŝipposedanta familio Broström Ingegerd daŭrigas la rakonton.
- ☆ Tre kortuŝa estas la historio de Helen Keller, rakontita de Monika. Mi vere admiras personojn, kiuj malgraŭ grandaj malfacilaĵoj partoprenas en la socia vivo. En Gotenburgo troviĝas asocio por surdblinduloj.
- ☆ En ĉi tiu numero, je la fino, troviĝas pluraj bildoj pri grupoj, faritaj de la naturfotisto Renate Säfström. Ĝoje ke ŝi volas kunlabori kun ni! Bv. rigardi ŝian retpaĝon!: Renate Säfström – "Foto por la Vivo" www.fotoforlivet.com
- ☆ Printempo estas survoje! /Siv

Besta komento pri homoj



El Facebook

Funkciado kaj historio pri la vakcinoj



Iru al: <https://www.youtube.com/watch?v=StNYRMSXXHc>

Inga Johansson trovis la filmon.

La almanako en marto

La 1an de marto nia pola amikino Elvira Twardowska havas "nomtagon".

Ŝi rakontas letere ke la katolika pastro unue ne volis doni al ŝi tiun nomon. Legu:

Kun mia nomo estas amuza historio. Mia patrino estis katolika kaj mia patro luterana. Ili decidis bapti min en katolika preĝejo sed la pastro ne volis akcepti la nomon Elvira, ĉar ĉiu nomo devas havi sian sanktulon-patronon. Ne estas sankta Elvira, do mi ne povas ricevi tiun nomon. Mia patrino estis tamen obstina kaj respondis, ke ne estas problemo, ni iros al luteranoj kaj ili certe ne kontraŭos elekton de la nomo. La pastro estis maljuna, ne ŝatis kvereli kun obstina virino kaj fine konsentis bapti min petante la patrinon, ke ŝi elektu la duan nomon kaj la ceremonio komenciĝis. La surprizo de la pastro estis granda kiam li demandis dum baptado pri la nomoj de la infano. Mia patrino fiere respondis – la unua nomo estu Elvira kaj la dua Henriko. La pastro estis tre surprizita tamen daŭrigis la ceremonion kaj poste aldonis, "nun mi vidas la nuran solvon – ŝi devas iĝi sanktulino".

Elvira

La 8an de marto estas la Internacia virina tago, kaj Siv havas nomtagon. Siv estas malnovnorda nomo kiu signifas mastrino. Siv estis edziĝinta al la dio



La jena statuo prezentas la svedan aktorinon Margaretha Krook (1925–2001). Per la floroj je la fono de Margaretha oni volas atentigi la spektantojn ke nur 10 % de la statuoj estas virinaj kun individuaj nomoj.

Ek de 1912 oni en Svedio celebras tiun tagon la 8an de marto diversmaniere. /Siv



Tor, kiu okazigis fulmotondron kiam li ĵetis sian martelon kontraŭ la troloj. Li veturis tra la ĉielo en ĉaro, tirita de virkaproj.

La Internacia virina tago estas celebrata la 8an de marto

Oni skribas pri malegaleco kaj la situacio de virinoj en la tuta mondo.

Citaĵoj de famaj svedinoj

Grandeco ne konsistas el fari kion oni volas sed voli kion oni devas.

Oni certe povus esti kuracita de siaj eraroj, se ili ne plaĉus al oni.

Reĝino Kristina (1626–1689)

Tempon per legado ne malŝparu...

Nia sekso malmulte tion bezonas,
Kaj se vi devas, legadon mallonge faru,
por ke la saŭco ne superbolu!

Skribis ironie Anna-Maria Lenngren (1754–1817)

Okaze de la Internacia Virina Tago

Anna-Lena Wahlberg rakontas pri tipa virina sorto de la 19a jarcento.

Anna-Lena estas parenco de mi. Ŝi faras genealogian reserĉadon. /Siv

Med anledning av Internationella Kvinnodagen berättar Anna-Lena om ett typiskt kvinnoöde från 1800-talet. Anna-Lena är en släkting till mig och hon släktforskar. /Siv



Brita-Maria Andreasdotter

Brita-Maria Andreasdotter!

Du föddes 1843.

Tänk om du kunde berätta för oss...

- om din mamma som blev änka när yngsta barnet var precis 1 år,
- om din farmor som blev änka när yngsta barnet var 1 månad,

Brita-Maria Andreasdotter!

Vi naskiĝis en 1843.

Imagu ke vi povus rakonti por ni....

- pri via patrino kiu vidviniĝis, kiam la plej juna infano estis ekzakte unujara,
- pri via avino (patroflanka) kiu vidviniĝis, kiam la plej juna infano estis unumonata

- om din mormor som blev änka när yngsta barnet var 7 år...

Om du kunde berätta om dina egna barn, som dog i difteri, om dem som drunknade, om de som emigrerade.

Du visste mycket om fattigdom och svält och du lärde din dotter att aldrig kasta mat. All gröt i kastrullen skulle noggrant tas tillvara.

Du fann dock ett sammanhang där kvinnor fick komma till tals och du reste runt och predikade.

På ålderdomen, sedan flera år blind, "såg" du in i en ny tid med tillförsikt och när dina ögon slöts för sista gången på ålderdomshemmet 1932, kallades du av personalen för "Mor Tålig".

Idag, på Kvinnodagen 8 mars, vill jag hylla dig, en av alla historiens många okända kvinnliga hjältar som burit så mycket.

Mormorsmormor Brita Maria Andreasdotter.

/ Anna-Lena Wahlberg

- pri via avino (patrinoflanka), kiu vidviniĝis, kiam la plej juna infano estis sepjara...

Se vi povus rakonti pri viaj propraj infanoj, kiuj mortis pro difterio, kiuj dronis, kaj kiuj elmigris.

Vi sciis multon pri malriĉeco kaj malsateco kaj vi instruis vian filinon neniam forĵeti manĝaĵon. Ĉiun pecon da kaĉo en la kaserolo oni zorgeme uzu!

Tamen vi trovis koneksojn, kie virinoj rajtis paroli kaj vi rondvojaĝis por prediki.

En la maljuneco, kiam vi ekde kelkaj jaroj estis blinda, vi "vidis" novan tempon kun fido kaj kiam viaj okuloj fermiĝis por la lasta fojo en la maljunulejo en 1932 la personaro nomis vin "Patrino Pacienca".

Hodiaŭ, en la Virina tago, la 8an de marto, ni volas honori vin – unu el la multaj nekonataj virinaj herooj de la historio, kiuj eltenis tiom multe.

Pra-praavino Brita-Maria Andreasdotter.

/ Anna-Lena Wahlberg

La jaro de la bovo



*** HODIAŬ ESTAS UNUA TAGO DE LA PRINTEMPO. ***

Jen, venis la bovo-jaro. Ĉiujn bondezirojn al ĉiuj. Gaje pasigu festotagojn. Ni kune ĝoju kaj festu.

Batzaya Tsetseg-Ulzii

La antaŭaj jaroj de la bovo estis 1937, 1949, 1961, 1973, 1985, 1997, 2009.

La eco de la bovo: La bovo volonte estas kondukanto. Ri* estas inspira, kaj igas personojn en la ĉirkaŭaĵo senti sin bone. Ri estas laborema kaj metoda, sed povas havi tro firman volon kaj esti tro obstina.

Bonaj profesioj povas esti: ĉefo, ĝardenisto kaj fajnmekanisto.

El Facebook /Siv

*) = li/ŝi

Tio estas ni, gruoj!



Fotis: Renate Säfström

Tio estas ni, gruoj!
Tiu ulo estas mia frato.
Ties vivon mi admiras!
Tia pompa beko.
Tia soniga fanfaron!
Tie sur la strando,
tie niaj nestoj.
Tiam la printempo venos,
tiel la someron ni sopiros!
Tiom amo varmigos mondon,
tial mi esperas.

Ingegerd Granat

Gruoj ĉe Hornborgasjön la 22an de februaro

sed tiam la granda invado ankoraŭ ne venis.



El Rumanio: Sagao pri gruo

Okazas ke Dio vagas inter la homoj sur la tero por esplori kiel ili fartas.

Foje li trovis ke insektoj ĝenis la homojn. Li kompatis la homojn, pensante ke eble estus pli bone ekstermi la insektojn. Tamen li volis ke la homoj kunlaboru pri tiu agado. Li kolektis ĉiujn insektojn en skatolon kaj donis ĝin al viro, kiu ĵus preterpasis. La nomo de la viro estas Alexie.

"Iru ĝis vi trovos profundan riveron kaj ĵetu la skatolon en la akvon. Vi ne malfermu la skatolon!"

La viro pluiris, portante la skatolon. Kiam li venis al ponto super riverego li pensis ke tie estas bona loko por forĵeti la skatolon.

Sed Alexie estis scivolema kaj unue volis scii, kio troviĝas en la skatolo. Zorgeme li iomete levis la kovrilon. Tiam la insektoj sin ĵetis kontraŭ la fendo. Alexie ektimiĝis kaj provis fermi la skatolon, sed vane. Ĉiuj insektoj forflugis kaj disvastiĝis en la tutan mondon.


Oni vidis insektojn ĉie, inter ŝtonoj, en la herbo, en la sablo, en la akvo kaj en la fendoj de la arboŝelo.

Dio vidis kio okazis kaj li koleriĝis (kiel la Dioj iam faris). Kiel puno li transformigis Alexie-n en birdon kun longaj kruroj kaj beko. En Svedio ni nomas ĉi tiun birdon trana, esperante gruo. Por denove esti homo, la gruo serĉas insektojn por kolekti ilin kaj meti ilin en la skatolon.

En Rumanio oni rigardas Alexie sanktulo, malgraŭ lia malobeo (aŭ dank al tio?). En la grek-ortodoksa kalendaro Sankta Alexie estas celebrata la 17an de marto. Oni diras ke dum ĉi tiu tago ĉiuj insektoj havos novan vivon.

En Gotenburgo iam gruoj abundis. Ne la birdoj sed maŝinoj, kiujn oni nomas gruoj.

Dum 200 jaroj Gotenburgo estis la plej granda havenurbo en Nordio. Sed pro la konkurenco de aliaj landoj la haveno ne plu bezonas tiom da gruoj. Tamen ankoraŭ restas kelkaj gruoj. Vidu:



Malofte esperanto havas la saman vorton por du malsimilaj aferoj.

Sed la gruoj en la haveno de Gotenburgo similas al la grandaj birdoj, ĉu ne?

En la surdlingvo oni signas Gotenburgon kiel gruo. /Siv

Sverigefinnarnas dag 24 februari

Som många vet har Sverige en stark anknytning till Finland. I båda länderna finns kulturella arv som kan spåras långt tillbaka vilket har gett upphov till en minoritet som kallas sverigefinnar. Denna grupp av människor består bland annat av krigsbarn, politiska flyktingar och finnar som sökte sig till Sverige för att arbeta.

Idag är Sverigefinnarna den största nationella minoriteten i vårt land och har till och med en helt egen dag – Sverigefinnarnas dag!

Den sverigefinska kulturen föds

Finland var en del av Sverige i nästan 700 år, fram till 1809 då landet förlorades till Ryssland. Under åren som svenskt flyttade många finnar till olika delar av Sverige för att arbeta, främst i skog eller gruvor. Några av dessa platser kallas fortfarande för finnskogar eller finnmarker. Andra flyttade hit eftersom det helt enkelt var deras land efter att Finland blivit svenskt i början av 1100-talet.

Folkslaget har alltså funnits i nästan tusen år och det kan tyckas vara konstigt att Sverigefinnarnas dag är en relativt ny dag i almanackan.

Även i en något mer modern tid flyttade många finnar hit för att arbeta. Under 1900-talets mitt fanns det, till skillnad från i Finland, gott om jobb i Sverige – mycket tack vare de växande industrierna.

Finnar har således sökt sig till Sverige under en lång period och vid flera olika tillfällen. Resultat av detta är att en stor del av vår befolkning härstammar från Finland och därav namnet sverigefinnar. Med sig hade de finsk kultur som på många sätt har fått en stark anknytning till det svenska samhället.

Sverigefinnarnas dag infaller 24 februari

Temadagen blev officiell 2012 men firades för första gången ett år tidigare. Anledningen till att just denna dag valdes beror på att det var den finländska folklivsforskaren och kulturpolitikern Carl Axel Gottlunds födelsedag. Gottlund, även kallad Svedjefinnarnas apostel, forskade om och




skrev ner berättelser av invånarna i de värmländska finnskogarna under tidigt 1800-tal.

Sedan 2014 har sverigefinnarna också en egen flagga med en kombination av de svenska och finländska färgerna: vitt, gult och blått.

Sverigefinländarnas dag firas för att uppmärksamma den nationella minoriteten i Sverige och främja den sverigefinska kulturen. I flera städer, så som Stockholm och Göteborg, anordnas kulturella evenemang på denna dag.

Från www.helgdagar.nu

La dua retkunveno de la Librorondo pri *Sesdek ok*



Jen kiel nia renkontiĝo aspektis en Google Meet. En la bildo: supre Andreas, Siv kaj Monica, sube Ingegerd + Lasse, Kerstin kaj Ann-Louise. Mankis Paulina, Magnus kaj Ingrid. La du lastaj celebris sian naskiĝtagon resp. la naskiĝtagon de 1-jara nepino. Paulina miksis la tempojn, sed la venontan fojon ŝi certe ĉeestos!!

Nun fino de la unua ĉapitro. La ĉapitroj estas sufiĉe longaj kaj ni bezonis 1½ horojn. Por la venonta fojo (28 marto) ni legu ĉapitron du.

Ann-Louise gvidis la diskuton. Se ĉiuj opinias same ne estos diskuto. Pri Esperanto kiel latinida lingvo mi lanĉis la malnovan argumenton ke Esperanto estas "La nova Latino". Neniu samopiniis. Hmmm... Tamen laŭ mi estas bona argumento por kuracistoj, apotekistoj, botanikistoj k.a. Ili ja alte taksas

la latinon kaj trovas ke ili jam komprenas multajn esperantajn fakvortojn. La latino ja ankaŭ havas altan prestiĝon.

Jes, ili ja pravus kiuj diras ke Esperanto estas elstara "paca" lingvo. Latinaj tekstoj plej ofte temas pri militoj.

La verkisto uzas la Mi-formon kaj direktas sin al "Ingrid". Nun ni scias iomete pri ŝi. Ŝi ankaŭ estas studento en Lund.

"Ĉu vi memoras, Ingrid..." estas ofta komenco de frazo. Björn, la rakontisto, priskribas ŝin kiel bone vestitan, kuraĝan, modernan stokholmaninon kaj sin mem kiel kamparanon en lignaj ŝuoj parolante la smolandan dialekton. Tamen estas nur komence ke li sentas sin malsupera. En la fino de la ĉapitro ili jam estas geamantoj. /Siv

Referaĵo de prelego de Orlando Raola



Nepras havi digitalan sperton, ĉu ne? Por ekzerci min mi por la unua fojo kuraĝis partopreni en Zoom-kunveno. Antaŭe mi partoprenis en la Libroronda kunveno per Google Meet, sed zoom estis nova por mi.

Je 19.30 h. dimanĉe la 14an de februaro mi sukcesis eniri la kunvenon. La aspekto de Peter Wraae kaj Ann-Louise Åkerlund trankviligis min. Male al la sperto de Google Meet mi ne povis vidi ĉiujn samtempe, sed ne gravis. La persono, kiu por la momento parolis estis bone videbla.



Orlando Raola (estrarano pri Kulturo, Kongresoj, Biblioteko, Eldonado). Foto de 2003, sed 18 jaroj ne lasis impreson sur lin laŭ mi.

La titolo de la prelego estis "Kiel mi esperantiĝis" kaj iomete pri lia laboro kiel estrarano en UEA.

Orlando Raola devenas el Kubo, kie li lernis Esperanton jam en la baza lernejo. Kelkaj personoj plej bone lernas en kurso kun gvidanta instruisto. Aliaj lernas mem per propra metodo. Al la lasta kategorio apartenas Orlando Raola.

Li estas kemia inĝeniero. Kun la tempo tamen li laboris tuttempe por Esperanto. Por la UK en 1990 en Havano li intense agadis.

Lian ideon translokiĝi en San Franciscon estis barita de Usono unu fojon. Li ja estis kubano kaj la malvarma milito regis. En 1994 li sukcesis, sed daŭris tri jarojn, ĝis lia familio rajtis veni.

Energia viro ĉiam ricevas novajn taskojn. Li prelegis, skribis, vojaĝis kaj havis diversajn komisionojn. Li eĉ vizitis Svedion. Iam ial li volis lerni la svedan. Sed eĉ se li ŝatas lingvojn ne eblas lerni ĉiujn lingvojn. Esperanto estas lia pli uzebla lingvo.

Kun lingvo sekvas kulturo. Mondaj kulturoj interesis lin. Granda kontrasto al la tropikaj kaj subtropikaj landoj, Nordio fascinis lin, aparte Svedio kun la Nobelpremio. Periode li kunlaboris kun la Sveda Instituto.

Vojaĝo laŭlonge de la norvega marbordo fiksiĝis en lia memoro. Estis vintro kaj li volis spekti la nordlumon. La ŝipo skuis kaj la vojaĝo ne estis tre komforta.

Ankaŭ pri Svedio li havis dubojn. Kial svedoj fieras pri IKEA. En Usono la mebloj estis grandaj. Lia edzino okupis pri stiloj i.a. la dezajno de mebloj. Verŝajne ili ambaŭ rigardis IKEA:n senstila vendejo.

Mi rekomendas al ili studi Ora Ĵurnalo:n. Ek de la decembra numero troviĝas "antaŭ-Ikea-Stilo", la baroka, la rokoko, kaj la renesanca stiloj. Venos pliaj. Mi atendas la stilon de Karin kaj Carl Larsson. Kun ok infanoj Karin tamen strebis plibeligi la ĉiutagan vivon. Ŝi aranĝis florbukedojn, kusenojn k.t.p. kaj Carl pentris ilin. La mebloj estas simplaj kaj

preskaj ĉiam blanke farbitaj. Mia plej prefera stilo! ... Ingegerd Granat faras la serion.

Demando al Orlando Raola: Kiel ni logu junulojn al Esperantujo? – certe grava demando al UEA-estrarano. Tiam li rakontis pri sperto en Britio. Estas du sekcioj de la sama klubo. Li trovis ambaŭ same agrablaj. Tamen en unu grupo estas nur maljunuloj (aŭ

preskaŭ) kaj en la alia nur gejunuloj. Kial? En Eŭropa estas tiel, en Usono ne. Do, logu gejunulojn per programo, kiu interesas kaj junulojn kaj maljunulojn – ekz. manĝo. Hmm, ĝi ne logus min.

Mi ŝatis mian unuan veran zoom-kunvenon. Havi kontakton trans la Atlantiko sen vojaĝkosto – **mirinde!** /Siv

Le chat et le soleil

de Maurice Carême (1899–1978)



La kato malfermis la okulojn
La suno eniris ilin.
La kato fermis la okulojn
La suno restis en ili.

Jen la kaŭzo ke en vesper'
Kiam la kato ripozas
Mi rimarkas en la nigro
du pecojn de sunbril'.



Letero el Viktorio, Kanado, la 22an de februaro

Lottie Ericson, kiun ni renkontis en Lahtio, skribis al ni la jenon:

” [.....] Mi scias ke estas multaj virusmalsanuloj en Svedio kaj multaj en Gotenburgo. La fratino de mia sveda amikino loĝas tie, kaj mi ĵus parolis kun ŝi. Ŝi ĉiam havas por mi multajn novaĵojn de Svedio.

La vintro baldaŭ finiĝas kaj en Viktorio kie mi loĝas, ne ofte neĝas sed ĉi tiun jaron ni havis tri tagojn de multe da neĝo, kio rezultis en ĥaoso ĉie en Viktorio, ĉar la urbo havas nur unu neĝoplugilon.

Sed familioj trovis siajn sledojn, portis ilin al montetoj kaj vere amuziĝis.

Sed nun floroj kaŝrigardas el la tero. Tamen mia amiko loĝas apud monto kaj kvarfoje ni skiis.

Sed ĉi tie en Viktorio mi esperas ke mi baldaŭ povas elpreni mian biciklon kaj ĝui la printempveteron.

Mi esperas por vi sanon, ridon kaj sunbrilon!!! Amike, Lotte.”

Dankon, Lottie! Same al vi! /Siv



El Vikipedio:

Viktorio estas la ĉefurbo de Brita Kolumbio, la plej okcidenta provinco de Kanado. Sur la plej suda pinto de Vankuvera Insulo, Viktoria

estas mond-ranga celloko por turismo; ĝin vizitas jare pli ol 3,65 milionoj da vizitantoj, kiuj aldonas pli ol miliardo da dolaroj (kanadaj) al la ekonomio de la urbo.



Viktorio ankaŭ estas haveno por kruz-ŝipoj, kiuj alkajiĝas ĉe la kruzŝipa stacio de Terpinto Ogden. La urbo ankaŭ havas ekonomian avantaĝon pro sia proksimeco al Kanada Militbazo Esquimalt, la ĉefa ĉe-pacifika mararmea bazo de la kanada militservo. Urbocentra Viktorio ankaŭ servas kiel la

komerca centro de la Ĉefurba Distrikto Viktorio; tie estas multaj noktokluboj, teatroj, restoracioj, kaj drinkejoj, kaj tie okazas pli grandaj regionaj eventoj. Piroteknikaĵoj kaj ĉeakvaj koncertoj allogas dekmilojn da viktorianoj kaj vizitantoj al la urbocentro. /Siv

Klimato en Viktorio

		Jan	Feb	Mar	Apr	Maj	Jun	Jul	Aŭg	Sep	Okt	Nov	Dec
Taga maksimumo (meze)	°C	7.0	8.6	10.6	13.1	15.9	17.9	19.8	20.1	18.5	13.8	9.4	7.1
Taga minimumo (meze)	°C	3.0	3.7	4.5	6.0	8.2	10.0	11.3	11.7	10.7	7.9	5.0	3.2
Precipitaĵo (meze)	mm	94	72	47	29	26	21	14	20	27	51	99	109
Neĝo (meze)	cm	10	3	1	0	0	0	0	0	0	0	4	8
Sunbrilo (meze)	h	74	94	150	202	267	274	328	297	204	153	83	67
Datumoj estas por Mezurejo Gonzales en Viktorio													

Similas al Gotenburgo, ĉu ne? /Siv

Kion ni faru por la fina venko?

de Lenke Szász

Same kiel ĉiu ĝisosta verdulo, mi multe cerbumadis pri la "fina venko" de nia kara lingvo Esperanto.

Dum multa cerbumado, mi ekhavis diversajn ideojn, kelkajn mi eĉ pruvis: Mi skribis gazetartikolojn, faris kursojn por instrui Esperanton, parolis pri Zamenhof, pri la bela "interna ideo", faris ekspozicion el miaj esperantaj libroj, bildkartoj ktp, sed la fina venko ne alvenis. Post la kurso nur unu—du komencantoj praktikis la lingvon per korespondado.

Kion fari, kion plu fari?

Se oni endormiĝas kun iu penso en la kapo, okazas foje, ke la solvo venos dum sonĝo.

Io simila okazis ankaŭ al mi.

Kiel disvastigi la lingvon de la amo kaj amikeco tra la mondo?

Respondis iu mistera aperaĵo, fantomo, spirito, mi ne scias, kiel ĝin nomi, kaj diris la jenon per stranga voĉo alimonda:

— Vi estas stulta kaj tute ne konas la homan naturon. Varbadi por tutmonda amikeco? Sensecaĵo! Oni ne volas ami, mense kaj anime pliriĉiĝi, sed ekhavi potencon kaj riĉecon.



— Sed..., mi intermetis — ni, la esperantistoj, estas pacamaj, amikemaj homoj.

— La fantomo hahais: Ĉu la esperantistoj estas pacamaj kaj amikemaj?! Legu iliajn akrajn disputojn, konstatu mem la malamikecon, malemon al harmonio, kiel iuj intencas forpuŝi el movadaj postenoj la "rivalon", kaj ne parolu al mi pri "pacaj batalantoj"! Batali, jes! Sed vi devas fari alian himnon, alian standardon, alian devizon, se vi volas, ke Esperanto disvastiĝu, precipe inter la junularo. La Movado bezonas aron da

gejunuloj. La naive pacamaj aŭ kaŝe/malkaŝe enviaj kaj intrigemaj maljunuloj neniam kondukos vin al la fina venko.

Mi iom honte pensis, ke en la vortoj de la fantomo estas iom da vero, kaj demandis timeme:

– Sed kio estu la devizo, kiu konkerus amase la junajn korojn?

MORTIGU LA MALAMIKOJN DE NIA IDEO!
EKAL BATALO! PEREU ĈIUJ KIUJ
MALSAMOPINIAS!

Tiamaniere vi varbos pli da homoj, ol per ŝafblekado pri amo kaj amikeco – li aldonis malestime kaj malaperis en la mallumo.

Nu, certe tio ne estis la spirito de Zamenhof. Kaj mia sonĝo fakte estis KOŜMARO.

Lenke – Sonĝemulo

Nemateria kultura mondheredaĵo finnlanda de Raita Pyhälä



En decembro 2020 UNESKO akceptis finnan saŭnumadon en sian liston de nemateriaj mondheredaĵoj. Ne temas nur pri la sinbanado sed pri kutimoj kaj tradicioj: kiel konstrui, hejti, uzi la saŭnojn, kiajn rakontojn, kantojn kaj mitojn oni aŭdas kaj kion oni faras post la bano.

En Finnlando staras 3,2 milionoj da saŭnoj, kelkaj el ili estas publikaj en urboj, hoteloj, naĝejoj, sed la plejparto estas privataj. 90 % el finnoj banas sin almenaŭ unu fojon semajne, kaj multaj banas sin dufoje aŭ pli ofte. Familio povas havi plurajn saŭnojn, la plej ŝatatan eble ĉe lago aŭ maro, kie la feriodomo situas. Unu saŭno kampare povas esti fumo-saŭno, kies hejtado postulas almenaŭ kvin horojn kaj kien oni portas la lav-akvon per siteloj el puto aŭ lago/rivero.

Alia saŭno povas esti plej moderna, kun duŝoj, elektra lumo kaj duonhora hejtado. La saŭno povas tamen esti same moderna, sed hejtata per ligno en 1–2 horoj.

Dum la 2a Mondmilito soldatoj banis sin en memkonstruitaj saŭnoj eĉ en tranĉeoj. Tio helpis ne nur pri la higieno, pedikoj, sed ankaŭ mense, kreante momentojn de malstreĉiĝo kaj bonaj memoroj. La saŭnon oni povis uzi ankaŭ por fumaĵi ŝinkojn aŭ fari farunon el terpomoj. Bildojn pri saŭnoj vi trovas ĉe **museovirasto.kuvat.fi**.

La nunaj reklambildoj pri saŭnoj, kie pozas junulinoj volvitaj en grandaj bantukoj trompas vin. En la saŭnojn oni kutime iras nuda. Ĝuste tiu nudeco bremsis kaj malfaciligis la akcepton ĉe UNESKO. En siaj petskriboj Finnlando provis eviti menciojn pri



la nudeco. En la saŭno oni agas laŭ la familiaj aŭ personaj kutimoj. En iu enketo oni demandis, ĉu la respondantoj iam seksumis en la saŭno. La plej ofta respondo estis ke ne,



pri seksaj aferoj oni kutime ne pensas en la saŭno, sed ekzemple se la geedzoj jam elsauĝnigis siajn lavitajn infanojn, ili iam profitis de la oportuno.



En la fora pasinto oni naskis kaj poste la patrino kun bebo ripozis en la saŭno. Oni uzis la ne tro varman saŭnon por kupado kaj ĉia kuracado. Multloke mortintoj estis lavitaj kaj revestitaj en la saŭno antaŭ la enĉerkiĝo.



En la plej malnovaj mitoj mortintoj revenas en la saŭnon ekzemple Kristnaske. La vivantoj lavu sin pli frue, por lasi tempon al la mortintoj. En pli novaj rakontoj oni rakontas pri la koboldo, kiu loĝas en la saŭno. Lin oni neniel ofendu!

Vinjeto de esperanta traduko de la unua finna romano Seitsemän veljestä de Aleksis Kivi, aperinta en 1870 en formo de kajeroj. La E-traduko aperis en 1947, tradukis Ilmari Ekström.



La Dinastio Broström en Gotenburgo

Parolturno diras: "En dinastio ofte estas ke la unua generacio akiras, la dua administras kaj la tria pereigas".

Parto 2.

Dan kiu administris ...

Dan Broström (1870–1925) estis edukita al ŝipposedanto kaj edziĝis rekte en la Gotenburĝan komercan aristokrataron. La edzino Ann-Ida, naskita "Mark" (1882–1965), estis unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la firmao.

Dan Broström estis politikisto por la liberala partio en la registaro. Li estis pli dinamika ol la patro Axel Broström kaj la firmao kreskis dum lia periodo. Pli da filioj kaj vaporŝipkompanioj ŝanĝiĝis al novaj linioj ekz. "Ostasiatiska Kompaniet" (Orientazia Kompanio) 1907, "Svenska Amerika-Mexikolinjen" (Sveda Amerika Meksika Linio) 1911 kaj "Rederi AB Sverige-Nordamerika" (Ŝipkompanio Svedio-Nordameriko) 1914, kun la tempo rebaptita al "Svenska Amerikalinjen" (Sveda Amerika Linio) kaj Dan Broström estis la unua aganta direktoro.

Jaro 1907 inaŭguriĝis la grandioza kontora palaco kiu situis ĉe la "Packhusplatsen" (Pakeja placo). Jam 1901 la firmao Broström mendis ŝipojn de Anglia ŝipkonstruejo, ankaŭ

oni akiris ŝipkonstruejon en Gotenburgo, "Eriksberg" 1915 kaj la akciaplimalto en "Götaverken" 1916. Dan Broström kreskis kiel administranto laŭ tio.





Dan Broström estis filo de Axel Broström kaj li edziĝis en 21:a de novembro 1906 kun Ann-Ida. La paro havis kvar infanojn, nome la filon Dan-Axel, kaj la filinojn Kerstin, Brita kaj Margaretha. Ĉiuj en la infanaro havis grandajn aŭ malgrandajn rolojn en la firmao Broström, sed tio estas alia historio.

Katastrofo okazis la 24:an de julio 1925. Dan Broström, Ann-Ida kaj ŝoforo veturis per aŭto en suda Svedio. Dan Broström, kiu havis grandan intereson por konduki aŭtoj, kaptis la stirradon kaj la aŭto renverŝiĝis en "Trönninge" sude de la urbo Halmstad.

Dan Broström mortis pro tiu fatala akcidento. La edzino Ann-Ida kaj la ŝoforo transvivis kun negravaj vundoj.

La cindro de Dan Broström estis transportita de "Halmstad" al Gotenburgo per boato kaj per aŭto al la hejmo ĉe "Skyttegatan" en la urboparto "Lorensberg".

La funebra procesio veturis en 29:a de julio 1925 laŭ itinero Gotenburga Avenuo – Ponto de Vasa – Okcidenta Havenostrato kaj la enteriga ceremonio havis lokon en la Gotenburga Katedralo. Post la ceremonio la nigra vagono kun Dan Broström pluiris super Okcidenta Havenostrato, Ponto de Vasa, Nova Aleo, Odirastrato al Orienta tombejo. La familia tombo situas ĉe riĉula altaĵo. Tie li restis, la granda administra ŝipposedanto kiu estis la plej grava por Gotenburgo kaj la urbaj loĝantoj.

Homoj translokiĝas al Islando

Kerstin Rohdin rakontas

ISLANDO, kies historio komenciĝis ĉirkaŭ la jaro 800. Tiam loĝis jam kelkaj ermitoj, monaĥoj devenintoj el Irlando. Meze en la 9-a jc velis vikingaj boatoj okcidenten al Irlando, kie ili atakis la monaĥejon Lindisfarne en la jaro 793.

Tio estis la komenco de la Vikinga periodo. Iom poste ili trovis Islandon. La irlandaj monaĥoj rapide forfuĝis, kiam la paganoj alvenis. La nomo de la unua nordlandano, kiu ekloĝis en Islando estas **Floki Vilgerdarsen**. Li flugigis tri korvojn, kiuj montris al li, kie troviĝas lando.



ISLANDO, vulkana insulo en la Norda Atlantiko, 100 260 km², 318 450 enloĝantoj.

En la golfo, kien li alvenis troviĝis multe da glacio kaj li donis al la lando la nomon "Islando". En diversaj jarcentoj, la temperaturoj estis tre diversaj ĉe la insulo. Dum la 17-a jc estis tre malvarme, "la eta glacia periodo".

Landnamabok, la libro, kiu rakontas pri tiuj, kiuj ekloĝis sur Islando, diras ke la unua, kiu prenis al si landon nomiĝis **Ingolfr Arnarson**.

En 874 du fratoj ekloĝis sur la insulo kune kun brutaro kaj sklavoj, kiujn ili rabis dumvoje. Ili flosigis la fostojn de la temploj de la paganaj dioj de hejmo en Norvegio. Tiuj alteriĝis en golfo montrante, ke tie estu ilia nova hejmo. Ili elboatiĝis kaj trovis, ke fumo elvenas el la tero. Ili donis la nomon **Rejkjaviko** (fuma golfo) al tiu loko.

Dum longa tempo okazis en Norvegio kvazaŭ civilmilito inter nobeloj, terposedantoj, pri kiu prenu la potencon kaj fariĝu "la reĝo". Pluraj nobeloj elektis por si novan vivon sur Islando.

En Landnamabok oni listigis 3000 nomojn de personoj alvenintaj. Tiu libro estis verkita

komence de la 13-a jc, longe post kiam la unua enloĝanto alvenis. Same oni skribis la sagaojn komence de la 13-a jc, longe post kiam okazis la eventoj, kiuj ludis dum 8-a – 9-a jarcentoj.

La sagaoj dividiĝas en diversaj grupoj; **kungasagor (reĝaj sagaoj)**, kiuj rakontas pri skandinavaĵoj "reĝoj" ekde la vikinga periodo ĝis la frua Mezepoko. La plej fama en tiu grupo.

La dua grupo estas familiaj sagaoj, kiuj rakontas pri la sorto de familio aŭ regiono. Unu el la plej famaj el tiuj nomiĝas "**La sagao de Egil Skallagrímsson**". Ĝi en sukoplana kaj drasta lingvo vivigas la vivon de tiu parenkaro. Oni prijuĝas tiun verkon kiel vera artaĵo. Pluraj sagaoj havas anonimajn rakontistojn.

La tria grupo estas **islandaj "fornaldarsagor"** (praaj rakontoj). Ili baziĝas sur malnovaj mitoj kaj havas karakteron de belarto.

En la fino de la 9-a jc **Harald Belharulo** gajnis kiel la reĝo de Norvegio kaj la nobeloj, kiuj estis venkitaj, ne plu sentis sin sekuraj en

Norge. Ili grandskale migris al Islando kaj "prenis multe da lando". La liberaj viroj kolektiĝis por krei leĝon, ili trovis lokon por kunveni, **Tingvellir**.

Tiu loko fariĝis parlamentejo de kie oni regis la landon kaj prijuĝis la krimojn kaj eventojn en la lando. La prezidanton de la parlamento oni nomis **godr**, vorto, kiu devenas de "gud" (dio). La prezidanto ludis similan rolon kiel gvidanto en la malnova pagana socio. Li devis respondeci por la socio, pagi por buĉoferoj, zorgi por kapitano kaj maristoj de alvenantaj ŝipoj.

Post la ŝanĝo de religio li devis pagi por konstruo de preĝejoj. Fama rakonto estas, ke la islandanoj ne volis baptiĝi en malvarma akvo de la lagoj, sed volis atendi ĝis oni alvenis al la varmaj fontoj, kiuj abundas sur la insulo. Godr devis koni la leĝon parkere kaj devis instrui al sia posteulo la saman tekston.

Ofte la viroj venis kun armiloj al Tingvellir, kun glavoj kaj pafarkoj. Okazis ke la malamikoj tuj vundis aŭ mortigis unu la alian. Kiam la mortintoj venis al la ĉielo "**Valhalla**" ili trovis multe da manĝo kaj fajron, kiu donis al ili varmon – du grandaj mankoj dum la vivo.

La tiama islanda vivo estis malfacila, krom manko de komforto, ili multe batalis inter si, mortigis unu la alian pro venĝo aŭ justeco laŭ pagana pensmaniero. La sagaoj estas plenaj de teruraj priskriboj kaj rakontoj.

Mi finas per citaĵo el la sagao de Egil **Skallagrimsson: "Patro kaj filo ne parolis unu kun la alia, nek malbonaĵon, nek bonaĵon, kaj tiel pasis la vintro."**

Konatiĝu kun la islandaj sagaoj tradukitaj esperanten de Baldur Ragnarsson.

Esperanto i Skärstad

Av Bo Sandelin

